

## ĈEA-retkomunikoj 1/2006

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio por cxuiuj rete atingeblaj membroj, sed ankaux senpage sendata al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri Esperantomovado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn.

Se vi tamen ne deziras ricevadi ilin, sufixxas via mesagxo kun la teksto "Ne sendadu" en la temlinio al <[chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)> kaj ni tuj eligos vian retadreson el la dissendolisto.

### ENHAVO

1. Popularigo de Esperanto en belega historia ejo
2. Ekskursoj ekster Cxehxion
  - 2.1. Asocio de Esperantistoj Handikapuloj intencas ...
  - 2.2. Buse al la Universala Kongreso de Esperanto ...
3. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas
4. Junularo de SET Lančov
5. Kalendaro de Esperanto-arangxo en Cxehxio
6. Cxefarangxo de najbaraj Esperanto-Asocioj
7. Esperanto-murkalendaro

### 1. POPULARIGO DE ESPERANTO EN BELEGA HISTORIA EJO

La 2-an de marto ekde la 15-a horo, enkadre de regulaj "Literaturaj jxauxdoj" en Spegula kapelo de Klementinum (Zrcadlová kaple Klementina) en Prago 1, okazos prezentado de la eldonejo KAVA-PECH. Gxi uzos la okazon kaj fokusigos la intereson (krom sia lasta cxehxa eldonajxo, nome fabel-libro "Pohádky s Mákem") al prezento de Esperanto prezentante el siaj libroj precipe tiujn rilatantaj al Esperanto, nome la novajxojn "Esperanto pro děti 2" kaj la 3-an eldonon de "Esperantem za tři měsíce", sed ankaux "Gramatiko de Esperanto", "Ilustrita Frazologio", ambaux vortarojn Esperanto-cxehxan kaj cxehxan-Esperantan, sed ankaux tradukojn el Esperanto cxehxen ("Interlingvistika" de D. Blanke kaj "Zamenhofova ulice" de R. Dobrzynski). Cxiuj interesatoj estas kore invitataj.

### 2. EKSKURSOJ EKSTER CXEHxION:

2.1. Asocio de Esperantistoj Handikapuloj intencas arangxi busan ekskurson al la 28-a Cxebalta Esperantista Printempo en MIELNO (Pollando) 13.06. - 21.06.2006. La buso veturus el Pardubice (12.06.2006 /lundo/ postagmeze) tra Prago kaj Berlino al Koszalin - Mielno, forveturo el Mielno la 20an de junio 2006 /mardo/ vespere, reveno al Pardubice 21.06. postagmeze. Prezo por veturo, logxado kaj mangxado 6 400,- gxis 7 000,- Kč (analogie al pago por logxado - vidu <http://www.esperanto.koszalin.pl/28cebalta.html> ). Por prijugxi realigeblecon de la ekskurso laux tiu cxi propono, bonvolu anonci vian intereson cxeesti gxin gxis 25-a de februaro 2006 al AEH ([AEH-IKEH@volny.cz](mailto:AEH-IKEH@volny.cz) ). En marta Informilo ni, laux intereso, anoncos finan decidon cxu la ekskurso realigxos aux ne. La ne-abonantojn ni informos per interreta re-raporto.

2.2. Buse al la Universala Kongreso de Esperanto en Florenco eblas vojaĝi kun esperantistoj el České Budějovice. Provizore oni kalkulis la prezon 7 000,- Kč por la buso kaj la logxado. Oni logxos ekster la multekosta urbocentro. Eblas ankaŭ aligxi al ekskursoj. Gxis nun aligxis 25 interesatoj - tial vi ankoraŭ havas eblon partopreni! Pliaj informoj cxe [mtomeckova@kpmg.cz](mailto:mtomeckova@kpmg.cz)

### 3. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) revigligxas post januara paŭzeto pro la universitata ekzamenperiodo. Ankoraŭ antaŭe, du cxehxaj junuloj cxeestis en la germana urbo Xanten la 49-a Internacian Seminarion, silvestran junularan arangxon kiu kunigis 174 cxefe eŭropajn esperantistojn. Dum gxi okazis i.a. sukcesa projekciado de la cxehxa filmfabelo Lotrando kaj Zubejda kun esperantlingvaj subtekstoj. La tradukon pretigis grupo de volontuloj el CxEJ. La arangxon cxeestis ankaŭ profesia filmisto, kiu tie faris du varbofilmetojn pri Esperanto, en kiuj aktoras ambaŭ niaj reprezentantoj. Raporto pri la arangxo kun fotoj kaj la filmetoj troveblas en la retpagxaro de CxEJ.

En 2006 aligxis al CxEJ jam 3 novaj membroj. Kelkaj el ili lernas Esperanton per komputila programo Kurso de Esperanto, por kiu CxEJ disponigas kursogvidanton. Sume CxEJ nun havas 44 membrojn. La atento de la asocio nun fokusigxas al la venontaj printempaj kaj someraj junularaj arangxo, el kiuj menciindaj estas Kreiva metiejo okazonta marte en Slovakio kaj la 62-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) kiu cxi-aŭguste okazos en Sarajevo en Bosnio kaj Hercegovino. La plej grava arangxo tamen sendube estos la Internacia Junulara Renkonto, kiun CxEJ okazigos inter la 8-a kaj 15-a de julio 2006 en Velehrad, Cxehxio, paralele kun la 59-a kongreso de IKUE. Temos pri la unua internacia junulara renkontigxo en Cxehxio post pluraj jaroj.

Aktualajxoj kaj pliaj informoj pri cxehxa junularo cxiam troveblas cxe <http://www.esperanto.cz/cej>

### 4. JUNULARO DE SET LANČOV

Por la cxijara Somera Esperanto-Tendaro (SET) ricevas rabaton membroj de "Junularo SET-Lančov" (vidu

<http://esperanto.blahus.cz/cxej/iru.php?lancov> )

kaj pliajn rabatojn, se ili helpas propagandi la tendaron en siaj lernejoj kaj akiras novajn tendaranojn. La supre menciita retejo prezentas ne nur fotogalerion kaj lingvajn ludojn, sed ebligas aliron al unuopaj etapoj registritaj cxe la retejo <http://www.tabory-vysocina.cz> kun rektaj retaj aligxiloj (on-line), kiujn kolektas Věra Podhradská ([podhradska@volny.cz](mailto:podhradska@volny.cz) ).

### 5. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANGxOJ EN CxEHxIO

La kalendaro estis publikigita en CxEA-retkomunikoj 4/2005 kaj ni intencas gxin denove aperigi en venonta numero de la retkomunikoj. Tial cxuiuj organizantoj estas petataj sendi koncizajn informojn (daton, nomon, temon, kontaktadreson, se eble retan) al la retadreso [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz). Nur de vi dependas, cxu la listo estos kompleta

aux ne! Krome, ne forgesu, ke iam ajn vi povas trovi la kalendaron kaj multajn pliajn utilajn informojn cxe <http://www.esperanto.cz>.

#### 6. CxEFARANGxOJ DE NAJBARAJ ESPERANTO-ASOCIOJ:

Slovakio: Tutslovakia renkontigxo de SKEF (Slovakia Esperanto-Federacio) kaj SKEJ (Slovaka Esperanto-Junularo) en Piešťany 2006-05-26/28. Vd.

<http://skej.esperanto.sk/arangoj.php?lingvo=eo&kio=45&akcia=podujatie>

Germanio:

Printempa Esperanto-Kunveno (BELO + BAVELO) kun la temo: "Europo - tio estas Vi! Cu Europo bezonas komunan lingvon?", Neu-Ulm-Ludwigsfeld, 2006-03-31/04-02. Info: Armin Grötzner <[ae.groetzner@t-online.de](mailto:ae.groetzner@t-online.de)>

Jubilea Germana Kongreso (Germana Esperanto-Asocio), Welfenhof, 2006-06-02/06: <http://jubileagek.ic-herzberg.de/>

Pollando:

La 22-a ARKONES - Artaj konfrontoj en Esperanto (Pola Esperanto-Junularo), Poznan, 2006-09-29/10-01. <http://www.arkones.republika.pl>

#### 7. ESPERANTO-MURKALENDARO

kun permeso de la auxtoro Petro Baláž mi sciigas al la interesatoj, ke eblas elsxuti murkalendaron por 2006, kun E-fotomozaiko, faritan de fotoj el UK kaj IJK 2005. Laux la informo de la auxtoro gxi estas farita por presi gxin en bona kvalito gxis la formato A3 (ne provite). Li dodas rajton al iu ajn libere presi kaj surmurigi gxin.

Dankon al li. Jen la adreso:

<http://esperanto.sk/varbiloj/kalendaro2.jpg>